# KANTO DE LA KOLOROJ

Ruĝa pomo (uzu la francan melodion "frère jacques")

Ruĝa pomo, ruĝa pomo, estas ĝi, estas ĝi.
Pomo estas frukto, pomo estas frukto, frukto, jes, frukto, jes.

Flava rozo, flava rozo, estas ĝi, estas ĝi.
Rozo estas floro, rozo estas floro, floro, jes, floro, jes.

Verda cedro, verda cedro, estas ĝi, estas ĝi.
Cedro estas arbo, cedro estas arbo, arbo, jes, arbo, jes.

Blua jupo, blua jupo, estas ĝi, estas ĝi.
Jupo estas vesto, jupo estas vesto, vesto, jes, vesto, jes.

Nigra kato, nigra kato, estas ĝi, estas ĝi.
Kato estas besto, kato estas besto, besto, jes, besto, jes.

Blanka mevo, blanka mevo, estas ĝi, estas ĝi.
Mevo estas birdo, mevo estas birdo, birdo, jes, birdo, jes.

Bruna tablo, bruna tablo, estas ĝi, estas ĝi.
Tablo estas meblo, tablo estas meblo, meblo, jes, meblo, jes.

Griza salmo, griza salmo, estas ĝi, estas ĝi.
Salmo estas fiŝo, salmo estas fiŝo, fiŝo, jes, fiŝo, jes.

– – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – – –

Sur la tero, bela tero, loĝas ni, kantas ni,
Kune sur la tero, monda familio, famili', famili'.